Israelaj esperantistoj en druza vilaĝo

Fine de oktobro 2008 (23-25) okazis la 9-a Komuna Israela Esperanto-Semajnofino (KIES). La unuan fojon ĝi daŭris tri tagojn.

La 32 partoprenantoj gastis dum du noktoj en ĉarma gastejo en la druza vilaĝo Bet-Ĝan (Supra Galileo) kaj ĝuis variajn ekskursojn, kulturan kaj socian agadon kaj pliajn interesajn programerojn.

La programa ĉeftemo estis *Folkloro, religioj kaj minoritatoj*. Kadre de tiu temo okazis ekskurso al la araba-kristana vilaĝo Ĝiŝ (Guŝ-Ĥalav) kaj vizito de la Ĉerkesa vilaĝo Riĥanija. La partoprenantoj konatiĝis kun la druza kulturo (kutimoj, religio, manĝaĵoj ktp) per folklora prezentaĵo kaj spektis lumbildojn pri triboj kaj minoritatoj en Tajlando kaj Vjetnamio. Aldone okazis en natura migrado. La aranĝon kunorganizis Nava Cinori kaj Amri Wandel.

Foto: la aŭtoro.

Kompare al la pasintjara KIES en Jerusalemo estis iom malpli da partoprenantoj, aparte mankis eksterlandanoj (pasintjare ĉeestis ses). Tamen, la partoprenantoj estis tre kontentaj pro la etoso, la programo, la gastejo kaj... la vetero. Fotoj videblas ĉe *http://picasaweb.google.com/amriwandel/9AKIES#*.

Sur la foto: parto de la KIES-partoprenantoj ĉe la antikva sinagogo Bar'am.

Amri Wandel